

friponaĵon, ĉar alie vi certe estus subskribinta la paperon kiel honestulo.”

Sekvis universala akklamado. Oni ja sentis ke tio estas la unua vere sprita diro, kiun la Reĝo diris dum la tuta tago.

“Tio pruvas ke li estas kulpa” diris la Damo.

“Ĝi pruvas nenion” diris Alicio. “Vi ja ankoraŭ ne scias ĉu la versaĵoj eĉ rilatas la nunan aferon.”

“Legu ilin” la Reĝo ordonis.

La Blanka Kuniklo almetis siajn okulvitrojn.

“Kie vi volas ke mi komencu?” li demandis.

“Komencu ĉe la komenco,” diris la Reĝo solene, “kaj daŭrigu ĝis vi venos al la fino; kaj ĉe la fino ĉesu legi.”

Jen la versaĵoj kiujn la Blanka Kuniklo legis:

*Li diris ke vi vidis ŝin
Kaj nomis min ĉe li, ho!
Ŝi laŭdis min (atentu ĝin)
Sed ne pri la talio.*

*Anoncis li ke restos mi
Ĉi tio—ni ĝin sciis.
“Se la aferon puŝos ŝi,
Ho ve al mi” vi kriis.*

*Al ŝi nur unu, du al li
Tri, kvar al ni li donis!
Sed ĉiuj venis re al vi
Li tion ne oponis.*

*Se mi aŭ ŝi en tio ĉi
Kulpiĝus, li tre fida*

*Ke igos nin liberaj vi
Kiel nin vi nun vidas.*

*Supozis mi ke estis vi
Malhelpo al la planoj
(Dolor' vi for! ekkriis ŝi)
De ni kaj ĝi—pri ranoj.*

*Ne sciu li pri ŝia ŝat';
Ĉar tiu devas esti
Sekreta—kiel diplomat!
Ĉu vi ne volas resti?*

“Jen la plej grava evidencaĵo kiun ni ĝis nun aŭskultis” diris kontente la Reĝo, kaj frotis al si la manojn. “Nun do la ĵurintoj konsid . . .”

“Se iu el ili povos klarigi ĝin,” diris Alicio—ŝi en la lastaj minutoj tiom grandiĝis ke ŝi jam ne timis interrompi eĉ la Reĝon mem—“mi donacos al li ses pencojn (250sd.); mi mem kredas ke enestas en ĝi eĉ ne unu ero da racia signifo.”

Ĉiuj ĵurintoj elskribis sur la ardezoj ke “Ŝi kredas ke enestas eĉ ne unu ero da signifo,” sed neniu el ili, malgraŭ la oferita premio, penis klarigi la versojn.

“Se enestas nenia signifo” diris la Reĝo “tio ja ŝparos al ni multe da ĝeno, ĉar signifojn ni ne bezonas serĉi. Tamen, mi ne estas certa” li daŭrigis, etendante la versojn sur la genuo kaj kritike per unu okulo rigardante ilin; “Mi malgraŭ ĉio komencas trovi en ili ian signifon. ‘Sed ne pri la talio.’ Nur rigardante la juĝ-